



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

TROMPITA AMO...

Vi ĉion diris mem... Kial vi ridis?
Ankoraŭ ĉe la kor' sufer' ne ĉesis,
ĉar mi forflugon per sopir' permesis
de mia amorev'... Ĝin vi perfidis!...

Plenfloras la ĝarden'... Ĉio silentas;
eĉ dum la nokt' l'arbar'... Vi ŝajne revas
je milda mort' per kisoj!... Ĉu ne kreas
ankoraŭ mia kor'...? Kial vi pentas?

Laŭ via dir' mi restas... Vi min amas!
kaj pruve jen brulkis'... Eĉ mi vin kredas,
sed... permesu... Mi ridas, ĉarmulin'...

Kor' via pro forlas' denove flamas
kaj pri feliĉ' parolas... Mi ne cedas,
pro la pens'... Dum ĉi nokt' ŝi trompis min!

FRANCISKO LLORÉNS MARTÍNEZ.



La pola samideano Sro. Paul von Prabucki

Karegaj samideanoj, amikoj kaj fratoj de Zaragoza

Longa, peniga, doloriga estis la vojo ĝis via bela urbo, sed la plej malagrablaj kontraŭaĵoj ne povas timigi vojaĝantan esperantiston, kiam li alproksimiĝas al loko, kie estas samideanoj, ĉar tiuj lokoj signifas por li ripozon korpan kaj animan, estas por li la fontoj, kie li ĉiam denove ĉerpas forton kaj kuraĝon. Dum multmonataj marŝadoj tra diversaj landoj mi daŭre tion spertis, neniam mi rilate nian esperantistan popolon seniluziĝis.

Do, ankaŭ tiu ĉi foje mi alproksimiĝis al via urbo kun la konsoliga penso pri ripozo kaj refreŝiĝo. Tri neforgeseblajn tagojn mi pasigis inter vi, kaj morgaŭ jam denove mi estos sur la longa, polva kaj sunbruligita vojo, iros renkonte al aliaj travivaĵoj, novaj emocioj, novaj samideanoj.

Sed mi ne povas forlasi vin, ne dirinte al vi kelkajn vortojn, ne espriminte al vi la sentojn, kiuj superbordiĝas en tiu ĉi momento en mia koro.

Amikoj, la tri neforgeseblaj tagoj en via rondo sufiĉus por pruvi, ke Esperanto estas pli, ol praktika lingvo, ke ĝi estas ligilo kaj helpilo tiel grava kaj efika, ke vane oni serĉus ion similan en la tuta mondo. Dum mia propaganda laboro mi ja ĉiam substrekas ĝuste tiun ĉi elstaran kvaliton de Esperanto, sed ĉe post la hodiaŭa tago, tion mi promesas al vi, mi ne laciĝos menciigi ĝuste vian urbon kiel tipan ekzemplon.

Ke miaj vortoj penetru al tiuj Centroj de la esperantista movado, kiuj ĉiam ankoraŭ dormetas en la agrabla sonĝo pri propra grandeco, ke tiuj ĉi vortoj ekskuu iliajn konsciencojn, por ke ili sekvu la belan vian ekzemplon. Por la bono kaj prospero de nia komuna afero, ni ĉiuj tion deziru!

Mi nur bedaŭras, ke per vortoj mi ne povas pentri tion, kion mi en tiu ĉi momento sentas, ĉar mi bone scias, ke la simplaj vortoj nur tre malklare povas diri al vi tion, kio movigas mian koron. Tamen kelkajn vortojn mi volas riski.

Dum tiuj ĉi neforgeseblaj tagoj mi vin ĉiujn senescepte admiris. Kian ĝuon kaŭzis al mi la babilado kun la loka Delegito de U. E. A., samideano Manuel Maynar, maljunulo, meritplena pioniro de

nia afero, kunfondinto de "Fraterco", kiu antaŭ du jaroj festis sian arĝentan jubileon. Kiel junece brilis liaj okuloj, kiam li parolis pri nia kara Esperanto, kun kiu videbla kareso li prononcis ĉiun esperantan vorton! Longe vivu li, longan tempon restu lia elstara personeco la brila, viva ekzemplo por nia juna, kreskanta generacio.

Kaj la prezidanto de "Fraterco"? La plej laŭdajn vortojn, kiujn mi por samideano Ramón Salas en ĉi tiu momento trovas estas jenaj: ĝusta viro sur ĝusta loko! Fakulo, spertulo, vera zamenhofano, kapabla tradukinto de "Sango kaj Sablo", viro, kiun ankoraŭ akompanas la plena forto de junulo.

Longa estas la vico, kiun mi povus citi. Sed ambaŭ ekzemploj karakterizas vin ĉiujn, eĉ la plej junajn, la komencantojn. Are vi akompanis min tra la urbo, gvidis min vespere al mia loĝejo, atendis min matene. Ho, kia entuziasmo brilis el viaj okuloj, kiam vi aŭskultis min, la eksterlandanon, kiam vi povis sukcese apliki dum la babilado kun fremdulo la lingvon, kiun vi lernis dum longaj vesperkuroj. Ne mirigis min via sinteno, ĉar vi havas inter vi bonajn ekzemplojn kaj fidele kaj fide sekvas ilin.

Amikoj kaj fratoj de Zaragoza. La lastaj vortoj, kiujn mi en la horo de deŝiro diru al vi, estu jenaj: daŭrigu sur la vojo, kiun vi elektis, kaj estu konvinkitaj, ke vi plenumas honoran kaj belegan taskon homaranan, ke vi plenumas taskon indan je via nobleco. Ne laciĝu! Faru ĉion eblan por pligrandigi la aron de la paca batalantaro, en kies unuaj vicoj vi staras, vi, pioniroj de nia sankta afero.

PAUL VON PRABUCKI.
Pola esperantisto.

Helpu vin, kaj Dio helpos vin

I

Oni rakontadas mirindajn aferojn, pri kiam Dio, Nia Majstro, piediradis tra la mondo kune kun Sro. Sankta Petro. Mi rakontos ian tradicion, se vi havas paciencon por legi min.

Unu el multaj landoj, kiujn Li vizitis, estis la bela, galica lando, eĉ oni rakontas, ke, kiam Nia Sro. alvenis Galicion, miregis pro la ĉarmo de niaj kampoj, pro la mistero el niaj arbaroj, el la ride-tantaj valoj, el la klaraj riveroj, el la trankvilaj fontoj, kaj pro tiom da bonajoj, kiom la Eterna Patro disemis tra la galica lando. Kiuj rakontas al ni tiun ĉi historion, ankaŭ diras al ni, ke la Dia Majstro diris al Sankta Petro, ke, se, kiam la diablo gvidis Lin sur la pinton de la monto por tenti Lin, montrante la plej grandan parton de la mondo, ĝi estus montrinta al Li la galican landon, eble estus estinta al Li pli malfacile antaŭeniri spite de la tento. Mi ne scias, ĉu tio okazis, kaj tial mi ne povas ĵuri ĝin, sed kredeble ĝi povas esti vero, ĉar en la mondo estas belaj kaj ĉarmaj landoj, sed tiel ravaj, kiel tiu galica, certe ne, tial ke Dio nur kreis unu Galicion kaj en ĝi eble estis la Paradizo.

II

Iun el la plej varmaj, someraj tagoj, forkurinte de la sunradioj kaj suprenirante la montvo-

jeton al Cañas, piediradis Nia Sinjoro kaj lia akompananto, Sro. Sankta Petro. Kiam ili alvenis sur la pinton de la monto, sidigis sub malgranda kaj aĉa ombro de pinarbaro, ĉar estis lacaj pro la piedirado.

Kiam ili estis pli okupataj pri konversacio, amuzante siajn okulojn per la belegaj de la paroĥo Sergude, apud Cañas, kiun ili rigardadis sub siajn piedojn ĉe la fundon de la monto, ili aŭdis, proksime elparolataj, grandajn ekkriojn, kiuj eliris el la interkrutaĵo, kiu finiĝis apud ili.

Stariĝis Nia Sro, kaj stariĝis ankaŭ Sankta Petro, kaj ili iris vidi, kio estis tio.

III

Tie proksime, ĉe la plej profunda kaj mallarĝa loko el la intermonto, estis duonrenversita ĉaro, pro la multaj sulkoj, kiujn havas la montvojo, ĉar ili estis ĉiam malbone zorgataj ĉe la vilaĝoj, kio estigas ilin danĝeraj.

La bona vilaĝano, ĉagrenita, meze de la intermonto kaj kontraŭ sia ĉaro havas apud si la pikilon. Levinte siajn manojn ĉielen, li ne faris alian klopodon meze de siaj singultploroj, ol preĝi al Dio kaj al ĉiuj sanktuloj, por ke ili venu helpi lin.

—Dio helpu min!... La ĉielaj Sanktuloj min helpu!... Kio okazos al mi!... Ĝis kiam mi restos tie ĉi?... Malfeliĉulo, mi!—kaj aliaj similaj ekkrioj estis ĉio, kion faris la vilaĝano, por eltiri sin el la danĝero, kaj li faris nenion pli, nek ŝajnis puŝi lin al ago tio, kio al li okazis.

Kompatis Sro. Sankta Petro, kiam li vidis la suferojn de tiu benita homo eĉ multe pli, kiam li vidis lian rezignacion antaŭ tiu malfeliciaĵo, kaj li diris al la Dia Majstro:

—He, Sinjoro! Ĉu ne estos bone, ke ni helpu tiun malfeliĉulon?

Ne respondis Nia Sro. kaj signalis al Petro, por ke li antaŭeniru.

IV

Mallaŭte grumblante iradis Sta. Petro iomete post Nia Sro. kiu agis kvazaŭ li ne aŭdas lin, kaj Li mallaŭte ridetadis pri tio, kio okazis al lia kamarado, ĉar Li legis sur lian penson kiel sur libron.

Jam apud Cañas, kien ili iras por serĉi loĝejon, tial ke la nokto rapide alvenas, en mallarĝa vojo apud la bordo de rivereto ili trovis alian ĉaron duonrenversitan pro la granda pezo, kiun ĝi surportis, kaj pro la multaj ektuŝoj kontraŭ la ŝtonojn, kiuj plenigis la vojon.

La vilaĝano ne faris, kiel la alia. Li ne preĝadis al Dio, nek al la Sanktuloj, tute kontraŭe, li malbenadis ĉiujn diojn, per ĉiaspecaj diroj, kio tremegigis la mulojn, sed post ĉiu diro li penadis per siaj tutaj fortoj restarigi bone la ĉaron.

Kiam Sta. Petro aŭdis tion, li volis apartigi Nian Sinjoron, sed tiu ĉi, anstataŭ atenti, kion Sta. Petro diris al Li, parolis tiamaniere:

—Jen, Petro, nun ni havas bonan okazon por bonfari. Ni helpu tiun ĉi viron, por ke li sin eltiru el tiu malhelpaĵo.

Petro rigardis la Majstron, sed li ne kuraĝis respondi kaj tute silentis, ĉar estis obeema, kaj ĉiuj tri malrenversis tute rapide la ĉaron, kaj la ĉaristo, post kiam li dankis ilin, parolis al la bestoj kaj li foriris kun sia ĉaro tute kontenta.

V

Piediradis Sta. Petro post la Dia Majstro denove grumblante, sed pli laŭte, ol la lastan fojon, ne komprenante, kial Nia Sro. ne helpis la unuan viron, kiam li preĝis al la Ĉielo, sed Li helpis al tiu, kiu havis buŝon tiel blasfemenan.

La Dia Majstro lasis, ke Petro grumbladis, kiom li volis, ĉar Li profitis ĉiujn taŭgajn momentojn por instrui, kiun Li intencis estigi la fundamenton de l'Eklezio, kaj li volis vidi, ĝis kie atingis la paciencon de Petro.

Tiu ĉi iradis maltrankvile, kaj tiel priokupate, ke li ne atentis pri la vojo, sur kiu piediradis, kaj, kiam li ektuŝis kontraŭ ŝtonon, li eksaltis por ne fali, ekkriante nevole.

—Kial Vi faris tion?

Turnis sin Nia Sro., ekridetis kaj, rigardante lin per kortuŝa rigardo atinganta ĝis la plej profunda loko el la koro, respondis:

—Petro, la unua homo esperis ĉion el la Ĉielo kaj li faris nenion. La dua, estas vero, ke li ne parolis dece, sed li helpis sin. Tiel, vi ne forgesu pri tio, kion mi diras: "Helpu vin kaj Dio helpos vin".

VI

Mia rakonto jam estas tute finita. Ĉiuj rakontoj havas sian kaŝintencan kaj same, kiel unu el la du studentoj piedirantaj de Peñafiel al Salamanca sukcesis elterigi la animon de la universitata diplomito Petro García, spite de la moko de la alia, vi certe scios eltiri la ĉefcelon el mia rakonto.

XAN DO MARTINETE.
El la galica lingvo, tradukis
E. BRUQUETAS

NAJTINGALA KANTO

Ni marŝis malrapide, ligite per la brakoj kaj ŝi kuŝigis sian kapon sur mian ŝultron.

La antikva vojo, la murmuranta rivereto kaj la grandaj arboj blovis al mia imagkapablo, la ĉarman rememoron pri revindaj tagoj pasintaj.

Kiel kutime, ni sidiĝis sub la giganta arbo perdita en la internajo.

Kaj rigardante ŝin, mi ne parolis, ĉar timis rompi la dolĉan kaj melankolian silenton envolvantan nin. Silento, kiun gaja najtingalo rompis per harmonia kanto.

Ŝiaj bluhelaj okuloj, sorĉe kaj vage, kun nedifnebla esprimo, rigardis kareseme la murmurantan rivereton, kies diafana akvo ame kisas la florojn, kiuj, lulate de l'zefiro, fleksiĝas je ĝia paso.

Denove, kaj ĉiam ĉe profunda silento, mi rigardis ŝin. Sed ĉi tiun fojon oraj, frizitaj haroj, ludemaj kaj maldiskretaj, neis al mi la neesprimeblan plezuron admirii ŝian belplenan, virgan vizaĝon.

Subite, ŝi sin turnis al mi kaj, kun ĉarma mieno, prezentis al miaj lipoj tiujn siajn ruĝajn kaj allogajn.

Kaj la najtingalo, diveninte sendube la feliĉon de tiu ĉi momento, daŭrigis sian dolĉan kanton.

JOSE GASCON CARRETER.

LA BUTERA-SORĈO:

Malriĉa viro en altrejna vilaĝeto iam iris al sia riĉa najbarino, maljuna virino, kiu havis la famon de sorĉistino. Li volis peti ŝin prunti al li ilon, kaj kiam la virino foriris el la vestiblo, por alporti la ilon, li ĉirkaŭrigardis scivoleme. Jen li ekvidis buterfarilon, en kiu la kamparanino ĵus estis buteriginta, kaj sub la buterfarilo estis fiksita ruĝa ŝtofpeco. Tio multe mirigis lin, kaj li ekhavis diversajn pensojn pri la ruĝa ŝtofo, la butero kaj la kamparanino, kaj rapide kaj sekrete detranĉis peceton de la ŝtofo kaj kaŝis ĝin en sian poŝon.

Hejme li fiksitis ĝin sub sian propran buterfarilon, enverŝis kelkajn kruĉojn de krema lakto kaj komencis buterigi. Jen okazis io miriga: Antaŭ ol la kamparaneto povis nombri ĝis dudek, formiĝis en la buterfarilo grandega bulaĵo da orflava butero; ĝi pli grandiĝis kaj pli grandiĝis kaj fine eĉ leviĝis super la randon de la buterfarilo.

La viro vendis la buteron kaj gaje revenis hejmen. Sed kiam li eniris sian ĉambron, kiun li antaŭ la foriro estis zorgo ŝlosinta, jen sidis fremda sinjoro ĉe la tablo; li estis ruĝe vestita kaj iom odoris laŭ sulfuro. La sinjoro estis tre afabla al la kamparaneto ŝvitanta pro timo, li montris al li grandan libron kun multaj nomoj en ĝi kaj diris, ĉar la kamparano servigis al si lian helpon kaj certe ankaŭ plue faros tion, li havu la afablecon, skribi sian nomon post la aliaj en la libron. La malriĉa homo petis pri tempo por pripensi, kaj la ruĝ-vestito foriris, sed diris, ke li revenos en la venonta vespero. En sia embarasego la kamparano rakontis la aferon al sia edzino, ĉi tiu insultegis lin pro lia peka facil-animeco, sed samtempe donis al li ruzan konsilon, kiel li povos liberigi sin bonmaniere de la malbonulo. Kiam en la veninta vespero la diablo venis kaj prezentis la libron al la kamparano, ĉi tiu kuraĝe trempis la plumon en sian propran sangon kaj skribis: "Jesuo, mia savanto vivas!" Li ankoraŭ ne finskribis la frazon, kiam la diablo ŝire forprenis de li la libron el la manoj kaj kun terurega bruo elflugis el la fenestro. For li estis kaj restis nenio krom forta sulfurodoraĉo kaj la libro, ĉar ĉi tiun la malbonulo lasis fali ĉe sia rapida adiaŭo. La kamparano levis ĝin, legis en ĝi kaj trovis ankaŭ kelkajn nomojn de homoj el sia vilaĝo, inter ili tiun de sia najbarino. Li forbruligis la libron en sia fajrujo kaj tiamaniere la diablo ĉi tiun fojon estis trompita ankaŭ pri la animoj, kiujn li jam posedis.

Tradukis,
E. SCHUTT.

Berlin-Friedenau.

PASTRO MOJADO MORTIS

La fervora kaj eminenta pioniro de nia movado en Madrido, Pastro Mojado, Prezidanto de la Hispana Esperanto-Instituto, mortis la pasintan monaton majo en la hispana ĉefurbo.

NIA VIVO okaze de ĉi tiu grava perdo por la enlanda samideanaro esprimas sian kondolencon kaj honoras la memoron je homo, kiu tiel entuziasme sin tute donis al nia kara afero.

Li pace ripozu!

LA FIDO

EL AMADO NERVO

Vi neniam timu en la korpemaj okazoj, diri optimisman vorton. Vi ne suspektu, ke la destino kontraŭdiru vin; la destino neniam kontraŭdiras la homojn, kiuj, de ĝi esperas, kaj ĝi ĉiam plenumas la promesojn, kiujn la fortuloj faras en ĝia nomo. Via bona deziro helpas, aliparte, meti sin mem apud ĉiujn belajn eblecojn de la ekzistado.

La favoremaj feinoj, kun la nevideblaj kofroj plenaj de favoroj, estas ĉiam atendantaj la memfidan kaj ameman voĉon, kiu pretendas ilin, pretaj favori la vivon kaj ĉiun amatan kaj belan estajon.

Sed estas necesege, ke tiu voĉo ne tremu mal-konfida...

Kiel vi volas, ke la bona hazardo haltu antaŭ viajn pordojn, ĉu vi ne kredas pri ĝi?

Via fido malfermas al ĝi la vojojn al via loĝejo.

La dubo estas maldensigebla kreskajarego, kiun la bongenioj ne povas transiri.

Prenu vian hakilon kaj haku energie la kreskajarojn: mi parolas pri la hakilo de la fido. Vi vidos, kiom larĝa fariĝos la vojo kaj, kiel ĝi invitas ĉiujn aventuremulojn trairi ĝin.

El la hispana lingvo tradukis,
FERNANDO DE LA PUENTE.
De la rondeto «La Kvara»

La Lekcio de Sro. Prabucki

La pasintan 31-an de majo okazis en la belega kaj impona kunsidosalono de la societo "Sociedad Económica Aragonesa de Amigos del País" tre interesa lekcio aranĝita de "Frateco", kiu profitis la ĉeeston en nia urbo de la tre klera gazetisto pola, samideano Prabucki.

Ĉi tiu sinjoro, post restado en Madrido dum tuta jaro, daŭrigas sian mondvojaĝon, trairante nuntempe Hispanlandon, por transiri en Afrikon la venontan aŭtunon.

La salonego, enhavante la tutan esperantistaron de Zaragozo, prezentis vivoplenan aspekton kaj la ĉeestantoj, ravate ĝuis la tre interesan paroladon de nia pola samideano, kiu per facila kaj lerta dirado temis pri siaj travivaĵoj kaj impresoj el la diversaj landoj de li trairitaj, rimarkigante speciale la gravan rolon kaj signifon de la helpemo kaj bonvolemo, kiuj regas ĉie ĉe la esperantistoj kaj kiuj valoras por vojaĝanto multe pli, ol sola lingvo, kiu ajn ĝi estas.

La parolinto estis varme aplaŭdata de la ĉeestantaro, kiu havis okazon alian fojon kontroli la taŭgecon kaj facilan kompreneblecon de nia helplingvo, kiam ĝi estas lerte uzata.

NIA VIVO je la nomo de Frateco deziras feliĉan vojaĝadon al nia klera samideano.

SCIIGOJ PRI ALCOY

La entuziasmaj kaj aktivaj samideanoj de la grupo Nova Vivo de Alcoy sukcesis, pri tio ke la tiea radiostacio disaŭdigu ĉiujn de dum horkvadono, de la 9^a ĝis la 9^{1/4} aŭ de la 9^{1/4} ĝis la 9^{1/2}, paroladeton pri Esperanto.

Ni tutkore gratulas niajn fervorajn samideanojn, kiuj tiom efike kaj sukcese laboras senĉese por propagandi nian karegan lingvon.

Nova Esperanto-Grupo en Madrido

En Madrido ĵus fondiĝis nova esperanto-grupo nomata "Esperanta, Madrída Asocio". Ĝi komencis kursojn de nia lingvo la 22-an de la pasinta majo en sia ejo: strato S. Joaquín 10.

NIA VIVO deziras al ĉi tiu nova esperanto-grupo prosperan kaj longan vivadon por la bono de la internacia lingvo.

La Ejo de «Esperanto» Kultura Klubo

La societo "Esperanto" Kultura Klubo, per letero sendita al la prezidanto de Frateco, sciigis al ni sian ejon: Candalija, 7, habitación número 11, kaj ĝin ĝentile metis je nia dispono.

Frateco multe dankas pro tio kaj deziras al la nova societo longan kaj prosperan vivon.

SPRITAĴOJ

Inter literaturistoj:

—Ĉu vi ne scias, ke nia amiko, poeto R. M., decidis, ke lia verskolekto ne estu publikigata ĝis post lia morto?

—Jen lerta ideo—diris verkisto C. J.—tiel ĉiuj ja deziras, ke li longe vivadu.

* * *

L. pruntedonas kvin durojn al R. kaj poste, la saman tagon, li trovas, ke R. sidas en restoracio lantaŭ telero surhavanta apetitigan salmon kun ovolea saŭco. L. indignante ekdiras:

—Nu! Ĉu por tio vi pruntepetis al mi kvin durojn, dirante, ke ili estas por rimedi vian preme-gantan situacion, kaj nun mi vidas, ke vi manĝas salmon kun ovolea saŭco? Ĉu tio decas?

—Ho!—respondas R.—mi ja ne komprenas vian sintenon: Se mi ne havas monon, mi ne povas manĝi salmon kun ovolea saŭco; se mi ĝin havas, tiam mi devas ne manĝi ĝin; do, kiam alvenos la taŭga okazo, por ke mi manĝu salmon kun ovolea saŭco?

* * *

Du malordvivemaj verkistoj vespermanĝas kune en malmultekosta restoracio. Oni metis antaŭ ilin kolbasetojn, kaj S. P. tre priokupate demandas:

—Aŭskultu: ĉu en ĉi tiuj kolbasetoj estas ĉevalviando?

—Trankviliĝu—respondis lia kamarado—plej certe en ili estas nek ĉevala nek alispeca viando.

* * *

—Kio estas malinfektilo?

—Ĝi estas ĥemia produktaĵo, per kiu oni estigas anstataŭ malagrable odoraĉo alian eĉ pli malagrablan.

* * *

Alvenas en sian klubon K. T., iu el kies okuloj estas terure ŝvelinta pro pugnobato.

—Kio okazis al vi?—liaj amikoj lin demandis.

—Mi ĵus renkontis Enrikon B.... li estis reveninta el sia edziĝa vojaĝo.

—Nu,... kio?—demandis la amikoj.

—Mi ĉiam multe konsilis al li, ke li edziĝu.